

Estis speciala prelego sub la temo “Kia diferenco estis en la postmilita likvido inter Germanio kaj Japanio” fare de s-ro Satoo Morio (vicprezidanto de Suita-Esperanto-Societo en Japanio). Li estas unu el la tradukintoj kaj ĉefroluloj de libro “Historio por Malfermi Estontecon — Moderna Historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio” (eldonita de Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2007).

Li emfazis en la prelego: “Ekzistas komuna lernolibro pri moderna historio inter Francio kaj Germanio, kiu eldoniĝis iniciatite de civitanoj, kaj uzatas por altlernejoj agnoskite de ambaŭ registaroj. Ankaŭ en Orientazio oni eldonis libron pri moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio, sed ĝin oni ne uzas en lernejoj en la tri landoj. Ĉar en la japana registaro ankoraŭ restas la militisma fajrero, kiu klopodas beligi iaman japanan imperi-armeon kaŝinte ties krimon dum la dua mondmilito. La milito ankoraŭ ne likvidiĝis en Orientazio. Oni devas lerni el historio por ne ripeti tiajn maljustajn aferojn. La pacamaj esperantistoj tradukis la libron pri la komuna historio, celante kontribui al paco kaj amikeco en Orientazio”.

En Interkona Vespero en la 3-a de majo, kiun gvidis s-ro PARK Yong-sung, oni babilis, ŝercis, dancis kaj kantis belajn kantojn Esperantajn kaj esperantigitajn el la japanaj kaj koreaj kun akompano de kanteja muzikilo. Kaj oni sate ĝuis bongustajn krudfiŝaĵojn, per kiu d-ro PARK Wha-Chong, prezidanto de NEL, riĉe regalis la partoprenantojn.

KIM Uson<kimuson@unitel.co.kr>;

Historio

S-ino Heidi Goes, la aŭtoro de la suba artikolo, estas belga lingvistino, kiu dum la lerneja jaro 1994-1995 partoprenis kulturan interŝanĝprogramon kaj loĝis ĉe sunda kaj javaj familioj en Ĝakarto kaj Jogjakarto, ambaŭ en Javo. La fondaĵo *Esperantic Studies Foundation* subvencias la esplorojn.

Esperanto en Indonezio (1)

De la komenco ĝis 1925

Heidi Goes

Enkonduko

Jam sufiĉe frue, en la komenco de la 20a jarcento, estis esperantistoj sur la teritorio de la nuna Indonezio. La pioniroj en la tiama Nederlanda Hindio^{*1} estis eksterlandanoj, precipe nederlandanoj, sed ne nur, kiuj venis tien kiel diversspecaj oficistoj, oficiroj, instruistoj kaj maristoj. Tamen ne tre longe post tio, ankaŭ pli kaj pli da indiĝenoj komencis lerni Esperanton kaj krei klubojn. En 1922 stariĝis la unua landa unuiĝo, kiu jam rapide disfalis.

En ĉi tiu unua artikolo ni vidos, kiuj estis tiuj unuaj esperantistoj, kiuj kaj kiaj estis la unuaj kluboj, revuoj, (lerno)libroj, la unua unuiĝo ktp. En sekvaj artikoloj^{*2} ni esploras kiel la movado pli kaj pli kreskis ĝis la dua mondmilito haltigis ĝin, kaj kiel ĝi post la sendependiĝo denove ekfloris sub gvido de la indoneziano Rankajo Chailan Sjamsoe Datoe Toemenggoeng, kiu organizis en 1960 la unuan Konferencon de Esperanto en Indonezio.

1. La unuaj esperantistoj en Nederlanda Hindio

Laŭ pluraj fontoj^{*3} la unuaj esperantistoj en Nederlanda Hindio estis L. Keidel en Kandang-Jati^{*4}, Probolinggo en 1902 kaj G. van der Noordaa en Surabaya en 1903, ambaŭ en Orienta Javo. Ne multe estas pri ili konate, krom ke ili ambaŭ estis adeptoj de la SPPE (*Société pour la propagation de l'Espéranto* aŭ Societo por propagando de Esperanto) kaj tiel aperis en *L'Espérantiste*. L. Keidel estis mekanisto ĉe la sukerfabriko de Kandang-Jati kaj ekde 1907 laboris kiel agento ĉe Sangerhäuser Actien-Maschinenfabrik und Eisengießerei (maŝinfabriko kaj ferverŝejo). La Jubilea Jarlibro 1937 de UEA mencias en la sama insulo ankaŭ A.C.A. Boers, kiu aperas ekde 1905. En Sumatro la unua pioniro estis Th. R. Kühr en Bajung Lintjir en 1906.

En la *Tutmonda Jarlibro Esperantista, enhavanta la adresaron de Dro Zamenhof por 1906* aperas krom la jam menciitaj pioniroj ankaŭ W. (Van) Lakerveld kaj W. Marinissen. Boers kaj van der Noordaa ne plu aperas en la *Tutmonda Jarlibro Esperantista, enhavanta la adresaron de Dro Zamenhof por 1907*, sed aldoniĝas Gerritsen Plaggert en Batavia (nun Ĝakarto, Javo), s-ino J.S.R. Baerveldt-Haver kaj f-ino F. van Loon en Padang (Okcidenta Sumatro), kaj J. Magnée en Medan (Norda Sumatro). Ĉiuj estis membroj de la Holanda Societo Esperantista *La Estonto estas Nia* (nederlanda asocio).

La unua Delegito de UEA en Nederlanda Hindio, Rupert Falkland Vaughan, estis brito, kiu aŭtodidakte esperantistĝis en tiama Brita Hindio en la jaro 1905 (vidu kadrotekston pri li). De 1909 ĝis 1916 li aperas kiel Delegito en Totok, Celebeso. Ĝis 1912 li estis la sola Delegito en la lando. En 1913 aldoniĝis Albert Knecht, unue poŝtofiscisto en Surabaja, kaj poste oficisto de kafoplantejo en Banjoewangi, Javo. Li partoprenis la Universalajn Kongresojn de 1911 kaj 1920 kaj seninterrompe^{*5} restis Delegito ĝis 1925 (vidu pri li ankaŭ en 2.).

Rupert Falkland Vaughan naskiĝis en 1878 en Singapuro, Malajaj Kolonioj. Li fondis unu el la unuaj Esperanto-grupoj en Hindio en Kolar, en 1906, kaj tie kreis kaj redaktis la gazeton *La Pioniro* ĝis sia foriro el Hindio en 1907. Li deĵoris dek kaj duonan jarojn en Celebeso kiel kemia provisto. Li poste laboris en Japanio kaj en Borneo, kie li emeritiĝis kaj restis ĝis sia morto la 7an de novembro 1958. Liaj artikoloj kaj rakontoj pri orientaj landoj aperis en *Heroldo de Esperanto* kaj en la de li mem eldonita revuo *Verdavaldo*. En 1956 li verkis manuskripton titolitan 'Veterano memoras' pri sia 50jara esperanta vivo, kiu ŝajne neniam estis publikigita.

En ĉi tiu periodo la esperantistoj estis malmultaj kaj tre dissemnitaj. Laŭ R.F. Vaughan, en letero al la posta revuo *Hinda Esperantisto* (vidu 2.), oni pensis pri Unuiĝo kaj pri malajaj

geesperantistoj en Hindujo ‘ŝlosilo’ kaj simile, sed pro la malmulteco de la esperantistoj tiutempe tia agado estis neebla. La aserto en *The British Esperantist* en aŭgusto 1912 ke oni konstante aŭdas pri la lingvo studata de ambaŭ eŭropanoj kaj indiĝenoj do ŝajnas al ni iom tro pozitiva.

2. La unuaj indoneziaj esperantistoj—vigliĝo kaj unuaj unuiĝoj

Verŝajne la unuaj esperantistoj en Indonezio, kiuj ankaŭ naskiĝis tie, estis la ĉindevenaj Liem Tjong Hie en Semarang, kiu esperantistiĝis en 1919 kaj restis aktiva dum sepdek jaroj (vidu kadrotekston pri li) kaj Kho Yok Siang. Tiu lasta aŭtodidakte lernis Esperanton en 1920 per lernolibro akirita pere de sia frato, kiu post studado en Japanio revenis al Indonezio. En la sekvaj jaroj la interesiĝo por la lingvo kreskis, ankaŭ inter la indiĝenoj. Kelkaj inter ili ankaŭ komencis instrui Esperanton kaj verki kaj eldoni en tiu lingvo. De 1920 ĝis 1934 preskaŭ ĉiujare la nombro de Delegitoj kreskis; de du en 1920 ĝis dek naŭ en 1934. Poste ĝi denove falis.

En 1922 aperis skriba kurso en la gazeto *Nerantja*, sub gvidado de la juĝisto Petrus Willebrordus van den Broek. La plej bona (sed laŭ aliaj fontoj ankaŭ la sola) lernanto estis la javano Kamso Wirjosaksono. Post la foriro de P.W. van den Broek instruis lin J. T. Kaptein, korporala maŝinisto. En la sama jaro stariĝis la nederland-hindia unuiĝo *Nederlandsch Indische Esperantisten-vereeniging*. Ĝi havis plejparte nederlanddevenajn, sed ankaŭ kelkajn aŭtoktonajn membrojn, preskaŭ ĉiuj loĝantaj de Javo. Dum ĝia mallonga ekzisto, en la jaroj 1922 kaj 1923, Albert Knegt aperigis ĝian propagandan gazeton *Esperanto - Propagandablad der Nederlandsch Indische Esperantisten-vereeniging* en Banjoewangi, Javo.

La protestanta pastro R.W.F. Kyftenbelt komence de 1923 starigis Esperantan Virinan Klubon en Menado, Celebeso. La

membroj estis enlandanoj (minahasanoj), eŭropanoj, kaj ĉinoj*⁶. Estis tri kursoj, laŭ la aĝo de la virinoj, kun entute 80 esperantistinoj. Bedaŭrinde fine de la jaro la pastro forlasis la landon kaj reiris al Nederlando.

Pluraj eldonaĵoj aperis en 1924: Kamsu Wirdjosaksono eldonis la propagandan gazeton *India Esperantisto* en malaja lingvo kun Esperanto-lecionoj; P. W. van den Broeck aperigis malajan gramatikon de Esperanto, kaj Liem Tjong Hie la unuan prozoverkon pri Javo en Esperanto (vidu kadrotekston pri li).

En majo aperis en *Heroldo de Esperanto* alvoko de J. Brotomidjojo al la ĉirkaŭ 30 esperantistoj en ‘insula Hindujo’: precipe al la Delegitoj de UEA, sed ankaŭ al Raden Mardio en Jogjakarta, Soetjipto en Sumenep, Rassat en Padang, kaj al aliaj, por instigi ilin agi pli vigle por la disvastigado de Esperanto. Li mem komencis en junio samjare kurson kun 10 personoj, kaj Wirdjosaksono alian kurson kun 15 personoj, ambaŭ en Jogjakarta.

Fine de la jaro la instruisto George Leopold Blot malfermis senpagan kurson en Djetis, Jogjakarta. Pli ol 30 katolikaj junuloj partoprenis kaj fine fondiĝis IKUE-rondo kun 9 membroj (IKUE = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista). En 1925 jam estis 11 membroj, sed en 1935 restis nur unu. La espero de G.L. Blot pri *Unuiĝo Orient-India de Katolikaj Esperantistoj* ŝajnis esti tro ambicia.

Liem Tjong Hie naskiĝis la 15an de januaro 1906 en Semarang, Javo. Li studis en la tieaj nederlandaj lernejoj kaj eble tie konatiĝis kun Esperanto, ĉar jam en 1919, nur 13jara, li esperantistiĝis. En 1924 li eldonis la unuan libron en Esperanto pri Javo, *Javaj legendoj kaj fabloj*, de li (re)verkita kaj tradukita. En la sama jaro li unuan fojon iĝis Delegito de UEA, kio li regule estos ĝis 1989. En 1925 li ekredaktis la revuon *Hinda Esperantisto*, kiu aperos neregule ĝis 1934. Li ankaŭ fondis la eldonejon kaj kursejon *Ekstremorienta Esperanto-oficejo kaj -Instituto* aŭ *Centraal Esperanto-Bureau & -Instituut*.

Ekde 1925 la indoneziaj esperantistoj ankaŭ komencis verki por internaciaj revuoj. Ekzemple Soengkono Wirjowerdojo aperigis tradukitajn kompilitajn artikolojn en *Sennaciulo* pri la politiko en Nederlanda Hindio. Wirdjosaksono verkis pri la javanaj geedziĝaj kutimoj por la revuo *Esperanto*. En *Heroldo de Esperanto* aperis de la mano de Liem Tjong Hie traduko de artikolo pri la malagrablaj sentoj inter la diversaj etnoj en Javo.

En la unua numero de *Hinda Esperantisto - Organo de la tuthinda Esperantistaro*, en oktobro 1925, la redaktoro Liem Tjong Hie alvokis al reunuiĝo kaj reciproka subteno de la ‘geesperantistoj en Hindujo’, sen konsideri rason, religion aŭ lingvon. La gazeto pretis esti la organo de la nova unuiĝo kaj montri ĝeneralan bildon pri la tutmonda evoluo de la Esperanto-movado. Samtempe li volis pere de sia revuo propagandi la lingvon. Pro tio aperis artikoloj en la angla, nederlanda, java kaj malaja. Kvankam li klare estis skeptika pri la tiama stato de la movado ‘kiu verdire ne povas esti nomata movado’, li estis ege entuziasma kaj laborema. La unuaj numeroj enhavis krome artikolojn pri plej diversaj temoj, de la historio de Nederlanda Hindio al literaturo kaj la Esperanto-movado en aliaj landoj, ŝajne ĉiuj de li mem verkitaj aŭ tradukitaj. (daŭrigota)

Provlegita de Roland Rotsaert kaj Ziko van Dijk, kiujn la aŭtoro dankas.

-
- *1 Antaŭ ol la nomo iĝis Indonezio, la lando ricevis de la lokaj esperantistoj plurajn nomojn. Krom Nederlanda Hindio aperas ekzemple ankaŭ Hindonesio, Hindonezio, Holanda Hindujo, Indio, Indonesio, Indonesujo, Nederlanda Hindujo, Nederlanda Orienta Hindujo, Nederlandindio, Orienta Hindujo Holanda kaj Orienthindujo. Por eviti konfuzon ni uzos ĉi tie nur la nomon Nederlanda Hindio.
 - *2 Je la fino de la lasta artikolo aperas resumita bibliografio de uzitaj fontoj.
 - *3 Ni ne povas scii pri tiuj kiuj ne konigis sin kiel esperantistoj.
 - *4 La antaŭa ortografio estis: Kandang-Djati. Ĉie kie nur la skribmaniero ŝanĝiĝis estos uzata la moderna ortografio. Kiam la nomo ŝanĝiĝis, estas uzata la nomo de la koncerna periodo, kun la moderna nomo inter

krampoj. Nur la konataj urbo- kaj insulonomoj estas esperantigitaj.

*5 Krom kompreneble en la ne-aperintaj jarlibroj dum militaj: 1915, 1917 kaj 1918.

*6 Ne estas klare ĉu la aŭtoro celas ĉindevenajn indonezianojn, aŭ ĉinajn enmigrintojn.

Kalendaro de Esperanto-aranĝoj

Ĉinio

Julio

2: Celebri Eldonadon de Gvidlibro pri Olimpikaj Vortoj

Aŭgusto

23-27: Esperantista somera semajno en Chongqing-urbo
Temo ESPERANTISTOJ ESTAS LIGITAJ PER LA KORJOJ.

Yuan Ailin <cqesp@vip.sina.com>

Septembro

: Renkontiĝo en Tajvano inter ĉefteraj kaj tajvanaj esperantistoj de Ĉinio

Koreio

Aŭgusto

6~10: La 3-a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Ŭonbulismo en Seulo

30: 'Memore al la 200-a kurso' de Seula Esperanto-Kulturcentro en Seulo

Oktobro

17~19: La 40-a Korea Kongreso de Esperanto en Busan

Novembro

15~16: Namkang-a Esperanto-Lernejo en Chongdo

Decembro

13/ 14: Naskiĝo-Tago de Zamenhof

LEE Jung-kee (esperanto@saluton.net).

Japanio

Oktobro

11-13: La 95a Japana Esperanto-Kongreso: urbo Ŭakajama

<jek08@jei.or.jp>

25-25: Intensiva Kurso de Kantoo-E-Ligo en Yatugatake-E-Domo

HORI Jasuo <horizonto@water.sannet.ne.jp>